



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 203

Marto 2003

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

★ ★

Ethel Alexander (1913-2002)

Dumviva membrino de Kanada E-Asocio kaj de UEA forpasis la 16-an de Aŭgusto 2002 sur la insulo Vankuvero, Kanado. Ethel naskiĝis kaj esperantistiĝis en Londono, Britio. Ŝi estis sekretariino de la Londona E-klubo dum ties prezidanteco de D-ro I. Lapenna. En 1962 ŝi forlasis Brition por iĝi edzino de aerarmea emerito en Kanado. Dum 22 jaroj ŝi ne aktivis en la E-movado. Post la morto de la edzo, ŝi ekserĉis samideanojn en Kanado kaj tiam surprize konstatis, ke la CO de Kanada Esperanto-Asocio troviĝas nur unu km for de sia domo. Ekde tiam ŝia hejmo iĝis ankaŭ hejmo por la insulaj esperantistoj, kaj ankaŭ la E-arkivejo kaj E-biblioteko. La samideanaro renkontiĝadis tie ĉiun semajnon por konversacii, havi afer-kunsidojn, kanti, kaj ĝui elegantan gastigemon de Ethel. Nun ŝi tre ege mankas al ĉiuj.

Olga Du Temple

LA TERO KAJ ĈIELO DE LATVIO

Ses jarojn Anna Zigure ambasadoris en Finnlando. Post la reveno hejmen ŝi verkis por finnaj legantoj libron pri Latvio. La proponon por tiu laboro faris konata finna eldonejo Otava en Helsinki. La verko aperis en 2000 kaj ĝi havas la titolon *La tero kaj ĉielo de Latvio* (Latvian maa ja taivas). Legeblas interesaj rakontoj pri la historio kaj nuntempo de la lando. La aŭtoro samopinias kun latvaj poetoj, kiuj emus kunpreni al fremdaj landoj tion, kio plej belas sur la regionoj ĉe la rivero Daugava – nubojn.

Tre longe la aŭtorino Anna Zigure skribas pri nuboj. Ŝi akcentas, ke latvoj amas nubojn. Ili vidas malofte tute serenan ĉielon. Preskaŭ ĉiam videblas nuboj, kiuj similas formojn de homa vizaĝo, ĉevala kapo, hundo, anĝelo de arbo aŭ de aliaj figuroj. Nuboj ofte aktivigis pentristojn, poetojn kaj verkistojn por fekunda kreado. Do - la aludo al nuboj estis iaspeca alegorio - haltigo de legantoj por cerbumi belecon, kion homo vidas ĉirkaŭ si mem. Tiujn nubojn mi deziris mem per propraj okuloj vidi, kaj tiucele mi vojaĝis al Rigo por pasigi la kristnaskajn festotagojn de la 22-a ĝis la 26-a de decembro 2002. Estis mia unua vizito en Latvio kaj ankaŭ mi estis kaptita kaj konkerita de la naturbeleco de la lando. La vizito neniel trompis min, sed plenumis ĉiujn miajn dezirojn kaj atendojn.

Anticipe mi ricevis praktikajn informojn telefone de Mara Timermane kaj Aristids Medins, kiun mi krome renkontis en Rigo kaj ricevis de li belan verkon **80 rakontoj pri la eterne juna 800-jara Rigo** skribita de Viktorija Tetere. Tiu ĉi 86-paĝa kajereto estas nepre bezonata helpilo al ĉiu, kiu vizitos la ĉefurbon de Latvio. La 25-a ĉapitro klarigas, kial oni ornamis per oraj kokoj kelkajn preĝejajn turpintojn. Estas konate, ke figuron de koko oni uzis kiel dekoraĵon de domoj kaj ventomontrilojn jam en la Antikva Romo. Latvaj kamparanoj klarigas laŭ sia maniero, ke tio estas rememorigo, por ke dimanĉe matene prepariĝante al la preĝejo oni ne forgesu hejme la donacojn al pastoro: kokon aŭ kokinon, ovojn kaj aliajn havaĵojn de kampara korto. Alia interesa detaleta estas **Tri fratoj**, kiuj prezentas diversajn fazojn de evoluo de mezepokaj loĝdomoj dum la tempo, kiam la domojn oni konstruis sur malvastaj areoj.

Pri la rivero Daugava, kiu dividas Rigon je du partoj, oni rakontas legendojn, poetoj dediĉas al ĝi poemojn kaj komponistoj kantojn. Ankaŭ la eminenta Esperanto-verkisto, hungaro Julio Baghy (1891-1967), kiu en 1932 dufoje gvidis E-kursojn en Latvio, ne restis indiferenta al la „sortorivero” de la latva popolo kaj post la vizito al Rigo verkis poemon pri Daugava. Tiun belan kreaĵon poezian vi povas legi en la komenco de tiu ĉi urba gvidilo por Rigo.

Estis al mi agrabla sperto interŝanĝi telefone pensojn kun Jazeps Slars, kiu faris okaze de diversaj BET-aranĝoj interesajn prelegojn pri la nuntempa Latvio. Oni publikigis kelkajn el liaj paroladoj en la serio „Biblioteko 1-4 de Esperanto-Asocio de Estonio 1998-2001”. Tre tikla estas la lingva situacio en Latvio - tiun ĉi problemon larĝe el diversaj vidpunktoj traktas s-ro Slars. Indas konatiĝi kun liaj pensoj kaj skribaĵoj. Jazeps Slars substrekis, ke li prezentas nur sian subjektivan vidpunkton al la temo, sed kompreneble li uzis ankaŭ materialon, kiu estis publikigita en la latva, ŝtata gazetaro. Li daŭrigas: Ni devas kunekzisti kun ĉiuj popoloj, tiel de oriento same kiel de okcidento, sed tio tute ne devigu nin kliniĝi antaŭ iu ajn. Ni devas zorgi pri necesoj kaj ekzistado de nia popolo. Ĉie kaj ĉiuj parolas nur pri interesoj de neinvititaj fremduloj, sed pri necesoj de la turmentita latva popolo oni tute ne interesiĝas. Latvio estas unu el la Eŭropaj landoj, kies loĝantaro plej rapide malkreskas. En la fino de la 80-aj jaroj en Latvio naskiĝis ĉirkaŭ 41 000 infanoj, sed poste la naskokvanto malgrandiĝis katastrofe. En la jaro 1995 naskiĝis nur 22 000, sed la mortokvanto progresis. Samtempe malpliiĝis la kvanto de latvoj. Dum 1995 latvoj malpliiĝis je 10 000. Oni povas resumi, ke en la menso de la latva loĝantaro, inkluzive de alinaciuloj, dum la lastaj jaroj evoluis kaj progresis sento pri Latvio kiel ŝtato, aparte en la menso de tiuj, kiuj pretigas sin ricevi la civitanecon pli aŭ malpli frue.

Konata pioniro en Latvio estis instruisto R. Libeks, kiu jam en la jaro 1889 verkis la unuan lernolibron por latvoj. Bedaŭrinde li elmigris al Brazilo en la 1890-aj jaroj kaj tio signifis ioman stagnadon en la movada evoluo. La *Enciklopedio de Esperanto*, eldonita en 1933 en Budapeŝto, detale raportas pri la fazoj de Esperanto en Latvio (aŭ en Latvolando kiel oni skribis en 1933).

Ni scias, ke en Vilnius, la ĉefurbo de Litovio, okazos la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2005. Tiam tre verŝajne oni aranĝos ion ankaŭ en Rigo. El Finnlando, Rigo estas survoje al Vilnius. Nepre haltu dum via kongresa vojaĝo sur la bordoj de Daugava. Havigu al vi la menciitan 86-paĝan gvidilon pri Rigo kaj legu ĝin jam hejme antaŭ la vojaĝo – tio efike helpos al vi en la ĉefurbo de Latvio.

Dankon al miaj latvaj helpantoj!

Jorma Ahomäki – Piispanristi, Turku, Finnlando
jahm@uea.org